



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 3-an de Oktobro 2022

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Inbar Mor, Amri Wandel;

zome: Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝaj Mor, Ŝlomo Ŝaĥar, Eran Yuval, Gabi Zeevi.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

1. Raportoj

a) **Amri:** mi sendis *IE173* – pli ol 100 eksterlandan, ĉ. 80 al israelanoj, kiuj ankoraŭ ne ricevis; kostis ĉ. 1,000 NIS. Kiel mi skribis rete, la ordigo de la etiketoj prenis multege da tempo, ĉar la plimulto ne estis surgluitaj, kaj pluraj estis fuŝprintitaj tiel, ke mi devis mane korekti. Ĉar mi ne plu regule iras al la universitato, mi devis speciale veturi al Jerusalemo. Pro tio ne plu indas, ke mi dissendu en Jerusalemo, kaj mi petas retiriĝi de la tasko de dissendanto. Estos pli simple kaj rapide, ke estonte Mikaelo mem tion faros, anstataŭ sendi al mi kovertojn kaj etiketojn. Necesas unu fojon malfermi por li konton de amasa dissendado en proksima al li filio, samkiel mi siatempe faris en Jerusalemo.

b) **Amri:** Jehoŝua kaj mi estis en kontakto kun s-ino Ŝulamit Tandler, la vivkunulino de la forpasinta d-ro Aharon Davidzon. Lastatempe mi iom korespondis kun ŝi kaj sekve ŝi sendis prezentaĵon pri E-o en la formo de intervjuo kun d-ro Davidzon, tre bele farita en *Jutubo*. Mi sendis ĝin al la *E-Whatsapp*. Ŝulamit ankaŭ eklernis E-on.

c) **Amri:** nur 42% pagis la membrokotizon de ELI por 2022. Tio estas skandale malalta procentaĵo. **Jehoŝua** nur memorigas al tiuj membroj, kiujn li kontaktas koncerne la kotizon por UEA. Kiu prizorgos ĉiujn aliajn? Ĉu Ŝlomo?

ĉ) **Jehoŝua:** la avantaĝoj en la projekto Konstruo-Evakuo pri la Dratverejo estas reduktitaj – tamen restis pli multaj, ol en la pli novaj tiaspecaj projektoj.

d) **Jehoŝua:** malgraŭ miaj klopodoj – la konfirmoj/malkonfirmoj de la partoprenontoj en la kunsidoj ne plimultiĝis. Se iu havas rimarkojn/aldonojn al la sendita tagordo antaŭ la kunsido – bonvolu tuj telefoni al mi pri korekto aŭ aldono.

2. La estonto de niaj Landaj Kunvenoj (Amri, Jehoŝua)

a) **Amri:** Jam la proksiman Zamenhofan Vesperon ni ekprovos fari en *Alon-Turo*, kaj ĉeeste kaj zome (=hibride). Ĝi okazos la 12-an de Decembro (lunde), komenciĝante je la 17h45 per libera babilado kaj personaj kontaktoj. La programo komenciĝos je la 18h00, daŭros ĝis la 19h00 kaj post 15-minuta paŭzo renoviĝos ĝis la 20h15.

b) **Gabi:** Jehoŝua devas memori al ĉiu, kiu ŝuldas ajnan kotizon, kiom necesas pagi, ĉu surloke, ĉu persone en zom-mesaĝo direktita nure al tiu (Amri povas instrui teknike kiel tion fari). **Jehoŝua:** poste la pagontoj devos telefoni al mi por aŭdi pri la pagmanieroj.

c) **Amri:** la regalo surloke estu minimuma, kaj oni povos libere uzi la kuirejton por prepari kafon aŭ teon.

3. Horŝanĝo de niaj Kunsidoj kaj Klubkunvenoj (Ŝlomo)

Amri: mi proponas rediskuti la temon, ĉar pasintfoje mankis kelkaj estraranoj, aparte tiuj kiujn la fruigo povus ĝeni: Dror, Inbar kaj Ŝaj. Ni povas atingi la saman rezulton deziratan de Ŝlomo, per akurata komenco kaj efika mastrumado de la kunsido. Jehoŝua ne malŝparu 15 minutojn ĉasante estraranojn por kvorumo. Iu alia tion faru, dum li komencas la kunsidon. **Jehoŝua:**

2/...



kvankam mi proponis sondi la opiniojn, mi retiras la proponon. **Decido:** la Estrar-kunsidoj komenciĝu precize je la 20h00 kaj finiĝu tiel, ke neniu malfruŭ sian hejmveturadon.

4. Luigo de la oficejo (Ŝlomo)

a) **Ŝlomo:** ni devas pagi VAT, sed ĉar luanto ne volas trakti fakturojn, la oficejo pri la Valor-Aldona Imposto malfermos por ELI dosieron. **Jehoŝua:** Ŝlomo trovu por ni la plej taŭgan vojon rilate tiun pagon, sed ni devas esti pretaj antaŭ la apero de luonto (endas subskribigi tiun tuj – kaj ne maltrafi, kiel okazis jam dufoje!). **Eran:** la eventuala luanto povas pagi ĉu monate ĉu 4-foje jare, ĉu jare – tio necesigas nur etan ŝanĝon en la kontrakto.

b) **Ŝlomo:** kiu pripagis la enigon de la “Atent-rimarkigo” ĉe la Katastrejo (“הערט-אזהרה ב"טאבו")? **Amri:** verŝajne Giora Goldfarb, la advokato de la antaŭa posedanto – do ne la advokatoficejo al kiu ELI pagis tiucele 2,000 NIS. Por peti repagon ni bezonas pruvon, ke la “Atent-rimarkigo” estis farita de alia advokata oficejo, ol tiu al kiu ni pagis (d-ro Modan eble povos akiri ĝin).

5. Maloftigo de niaj Klubaj Kunvenoj (Amri)

Jehoŝua: tia maloftigo kondukos al la formorto de la klubo *Josi Ŝemer*.

Amri: ni taskigu al Jehoŝua sondi la membrojn pli specife, ol mi faris en la lasta mesaĝo al ELI-listo, kie estis samtempe pluraj temoj.

6. La venonta Israela Kongreso (Amri)

Amri: la 23-a IK okazos la 13-15 deAprilo 2023. En ambaŭ junulargastejoj apud Tiberiado ne estis jam lokoj, sed ja troviĝis en malmultekosta hotelo *Panorama* en la urbocentro, proksime al la plaĝo. Ĝi ne havas salonon, sed tiu estas luebla ĉe sinagogo en la sama konstruaĵo por 700 NIS tage. Tiu hotelo ne servas manĝojn, sed havas kuirejon por mempreparo kaj manĝosalonon. Matene kaj vespere eblas manĝi en la proksima hotelo *Leonardo*. Sabate posttagmeze ni povas kunveni en la manĝejo de la hotelo, ĉar tiam ĝi ne estos uzata. Prezoj: en dulita ĉambro 150 NIS por persono/nokto ĵaŭde kaj sabate, 200 NIS vendrede. Antaŭpago: duono de la sumo unu monaton antaŭe; 15 ĉambroj menditaj (13 – 2-litaj kaj 2 – 3-litaj).

Voĉdono: *unuanime akceptita k laŭdata!*

7. Israela Esperantisto (Mikaelo)

a) **Mikaelo** bezonas informojn pri la IK kaj kelkajn fotojn pri la ejo kaj la panoramo por reklamo en la venonta IE (aperonta en decembro). **Amri:** ĉar ni decidis pri la IK relative frue, ni povas jam aperigi la tradician anoncon en revuo Esperanto kaj informi en nia retejo. En mia lasta mesaĝo al ELI-listo mi informis detale kaj invitis jam registriĝi; mi sendos ankaŭ por IE.

b) **Jehoŝua** aldonos nekrologon pri d-ro Davidzon.

La venonta kunsido: lunde, la 7-an de Novembro 2022, je la 20h00
(Alon-Turo-2, hibride).

Protokolis: Gabi Zeevi